

2025.2.25 Brazilo

Usono faris Ukrainion militi (ekde 2014) kontraŭ Rusio. Eŭropo (miope) apogis malprofite al siaj popoloj (inflacio). Rusio memkompreneble venkas. Usono, la profitanto, rezignas por alia prioritato: Ĉinio. Tajvano tamen plu rezistas al militi Ĉinion... **Drakoluiz**

2025. 2. 25 Brazilo

米国は（2014 年以來）ウクライナをロシアとの戦争に駆り立ててきた。欧州は（近視眼的に）インフレという損害を被りながらウクライナ国民を支援してきた。ロシアが勝つのは明らかだ。受益者である米国は、別の優先事項である中国のために諦めている。しかし、台湾は中国との戦争に抵抗し続けている... ドラコルイス

2025.2.26 Francio

Kara Jasuo,

Ja, mi ankaŭ pensas ke Trump nur interesiĝas pri maloftaj metaloj en Ukrainio. Por li kio gravas estas evoluigi kaj pli da teknologioj por esti la mastro de la mondo. Por Trump, homoj ne havas gravecon, nek planedo sur kio ni vivas. Ankaŭ mi estas tre malĝoja. **Lalao**

2025. 2. 26 Francio

親愛なるヤスオ様 実際、トランプ氏はウクライナの希少金属にしか興味がないとも思います。彼にとって重要なのは、世界の覇者になるためにさらに多くの技術を開発することです。トランプ氏にとって、人々は重要ではないし、我々が住む地球も重要ではない。私もとても悲しいです。 **ララオ**

2025.2.28 DR Kongo

Mi nomiĝas Charline Tumusifu. Mi naskiĝis en aprilo 1996 en la urbo Goma en DR Kongo. Mi estas flegistino, sed nun senlabora.

Mi lernis Esperanton en 2014, kaj en 2016 mi komencis instrui Esperanton iom post iom ĝis nun kaj ĝi fariĝis mia ŝatata lingvo, ĉar ĝi estas lingvo de la koro. Ĝi kunigas ĉiujn kaj neniun ekskludas. En la Esperanto-movado ne ekzistas rasismo, kaj ĝi ne dependas de la deveno de homoj.

Mi praktikas Esperanton, dum mi instruas miajn studentojn en mia klubo, kaj mi parolas en Esperanto, eĉ kiam ni estas en la kvartalo. Mi praktikas Esperanton ankaŭ kun amikoj tra la tuta mondo. Mi praktikas Esperanton kun ĉiu, kiu volas korespondi kun mi.

En la movado mi jam partoprenis en pluraj kongresoj, kaj en 2024 mi havis okazon partopreni en la UK en Tanzanio. Dum la kunsido en ĉi tiu kongreso mi prezentis etan

teatron temantan pri diskriminacio kontraŭ afrikaj virinoj, precipe en la orienta parto de nia lando, ĉar ekzistas ankoraŭ nemalmultaj familioj, en kiuj knabinoj ne rajtas lerni, ĉar ili ne estas konsiderataj senvaloraj, aliflanke knaboj estas konsiderataj valoraj.

Post la teatraĵo mi parolis pri malsekureco, seksa perforto kontraŭ virinoj kaj infanoj kaj senhejmaj infanoj. En mia regiono multaj infanoj perdis siajn gepatrojn dum la milito kaj fariĝas orfoj. Mia celo estis konigi la mondon pri la situacio en mia lando, peti helpon al ili kaj serĉi pacon. Poste mi kantis kaj dancis, montrante la kulturon de nia lando.

Post la kunsido la ĉeestantoj donis al mi grandan kuraĝon kaj promesis, ke ili helpu nin. Mi esperas, ke Esperanto donos al mi pli da forto por paco en mia lando kaj en la mondo.

Jen mia parolado, kiun mi prezentis en la afrika virina kongreso, kiu okazis en Tanzanio, kaj mi prezentis ĝin en la universala kongreso sed ne estis sufiĉe da partoprenantoj.

Saluton karaj esperantistoj el la tuta mondo

Mia nomo estas Charline Buhendwa Tumusifu

Mi estas ĉi tie por doni al vi mallongan paroladon: mia lando estas unu el la afrikaj nacioj, kiuj vivas en milito, masakroj, malsekureco. pro ĉi tiu milito niaj fratinoj, niaj patrinoj estas seksperfortitaj, niaj infanoj fariĝis orfoj kaj virinoj restis vidvinoj, kaj niaj filinoj portas fruajn gravedecojn kaj niaj patrinoj trovas nedeziratajn gravedecojn pro la banditoj, kiuj faras ĉion por malriĉigi la loĝantaron. Niaj gepatroj estas mortigitaj kiel ŝafoj sen kompatato. Vivo de homo estas vidita kiel tiu de moskito, ni vivas en timo kaj malespero ni vivas en la malboneco de armitaj viroj estas tiom da infanoj surstrate, kiuj ne havas lokon por loĝi, kie manĝi, ili estas analfabetoj pro manko de rimedoj, ilia estonteco en malespero la senkulpaj infanoj suferas de subnutrado pro manko de viglado pro la intensa doloro sekiĝis niaj larmoj ni komencis devigi nin vivi kun niaj vundoj ĉar neniu parolas pri ni.

Jen kial mi venas al vi, por ke vi helpu min krei por paco, paco, ni volas pacon en DR Kongo. Mi diras: ĉesu la militon, ĉesu la malsekurecon, ni bezonas pacon Inter ni. Estas certaj homoj, kiuj travivis ĉi tiujn terurajn tempojn kaj kiuj vivas kun ĉi tiu doloro en la koro tial, se ni krias pri ĉi tiu malbona situacio en nia lando. estas ĉar ni ne volas, ke aliaj homoj suferu la saman sorton, kiun la plimulto el ili suferis.

Mi tre dankas Esperanton, lingvo kiu ekskludas neniun ĉu ĝi estas via deveno, via raso, Esperanto estas por ĉiuj. Esperanto vivu eterne.

Dankon por via afabla atento

2025. 2. 28 コンゴ民主共和国

私の名前はシャルリン・トゥムシフです。私は1996年4月にコンゴ民主共和国のゴマ市で生まれました。私は看護師ですが、現在は失業中です。

私は2014年にエスペラント語を学び、2016年から少しずつエスペラント語を教え始め、今ではエスペラント語は心の言葉なので、私の一番好きな言語になっています。それはすべての人を団結させ、誰も排除しません。エスペラント運動には人種差別はなく、人々の出身地によって決まるものではありません。

私はクラブで生徒たちに教えるときにエスペラント語を練習し、近所にいるときもエスペラント語で話します。私も世界中の友達とエスペラント語を練習しています。私は、私と連絡を取りたい人とは誰とでもエスペラント語を練習します。

私はすでにこの運動のいくつかの会議に参加しており、2024年にはタンザニアでの世界エスペラント大会に参加する機会がありました。この会議のセッション中に、私はアフリカの女性、特に我が国の東部における女性に対する差別をテーマにした小劇を上演しました。というのも、男の子は価値があるとみなされている一方で、女の子は価値がないとみなされているために、勉強を許されない家庭がまだかなりあるからです。

劇の後、私は不安、女性や子どもに対する性的暴力、そしてホームレスの子どもたちについて話しました。私の地域では、戦争中に多くの子供たちが両親を失い、孤児になりました。私の目標は、自国の状況を世界に知らせ、助けを求め、平和を求めることでした。その後私は歌ったり踊ったりして、私たちの国の文化を紹介しました。

会議の後、出席者は私に大きな勇気を与え、私たちを援助することを約束してくれました。エスペラント語が私の国と世界の平和のためにさらなる力を与えてくれることを願っています。

下はタンザニアで開催されたアフリカ女性会議で私が行ったスピーチです。

世界中のエスペランティストの皆さんこんにちは 私の名前はシャルリン・ブヘンドワ・トゥムシフです 私は皆さんに短いスピーチをするためにここに来ました。私の国は、戦争、虐殺、不安の中に生きているアフリカの国の一つです。この戦争のせいで、私たちの姉妹や母親はレイプされ、子どもたちは孤児になり、女性は未亡人になり、娘たちは早期妊娠し、母親たちは望まない妊娠をしています。それは、国民を貧困に陥れるためにあらゆる手段を講じている盗賊たちのせいです。私たちの両親は容赦なく羊のように殺されます。人間の命は蚊の命のようにみなされ、私たちは恐怖と絶望の中で生き、武装した男たちの邪悪さの中で生きています。路上には住む場所も食べる場所もなく、資源不足のため読み書きもできず、将来に絶望している子どもたちがたくさんいます。無実の子供たちが栄養失調に苦しみ、激しい痛みの中で涙も枯れ、誰も私たちのことを世話してくれないので、私たちは無理やり傷を抱えて生き始めました。

私が皆さんのところに来たのは、皆さんが平和、平和、コンゴ民主共和国に平和を願う私の叫びを助けてほしいからです。私は言います。戦争を止め、不安を止め、私たち自身の間の平和が必要です。この恐ろしい時代を生き抜いてきた人たちの中には、心の中に痛みを抱えて生きている人たちもいます。だからこそ私たちは、この国の悪い状況について声を上げているのです。それは、ほとんどの人が経験したのと同じ運命を、他の人々にも経験してほしいからです。

私はエスペラント語にとっても感謝しています。エスペラント語は、出身や人種に関係なく、誰も排除しない言語であり、すべての人のための言語です。エスペラント語が永遠に生き続けますように。

ご清聴ありがとうございました。

2025.3.1 Ĉehio

Saluton sinjoro Jasuo.

Certe ví pravas, klopodo de sinjoro TRUMP tute ne pri paco. En Ĉehio oni konas proverbon: Muzelo ne estas stalo, ne eblas fermi se brutaro blekas. Eĉ se tio ne sonas bele, sed g[^]uste priskribas situacion, kiu okazis dum kunveno en TRUMP kabineto, inter TRUMP kaj ZELENSKÝ. Ĉar TRUMP komencis kunvenon je streboj rompi ZELENSKY, altrudi al li siajn kondiĉojn. Li komencis je misinformoj, malpravaj akuzoj ofendoj, minacoj, postuloj, brutala atako al ZELENSKIJ. Li ne proponis iun garantion de forta kaj daŭra paco, fakte li ne proponis almenaŭ ion akcepteban, sed ektimigi aŭ humiligi homon, kiu eltenis gvidi sufiĉe grandan Landon dum tri jaroj de milito, ne estas facila afero. Viro, kiu spertis jam tri jarojn de ĉiutaga rusa bombado, deliran kritikon de TRUMP brave dementis.

Kaj ĉi tie ne temas pri diplomatikaj scipovoj de ZELENSKY, ĉar antaŭ la kunveno TRUMP forj[^]etis el sia kabineto polan prezidenton post 7 (!) minutoj de interparolo. Kaj aliaj europaj diplomatoj finis preskaŭ same. Do TRUMP estas diplomato kiel bagro, li kredas nur al tiuj statistikoj, kiuj mém falsis, al ordinaraj homoj rigardas kiel Demiurgo, malgrau ke ankoraŭ faris nenion utilan eĉ pór sia Lando.

En Usono oni parolas pri esprimo de malfido al li, ĉar li desapontis ege multajn homojn. Li disdonas multajn promesojn, kiujn li ne povas plenumi. Kaj j[^]eti akuzojn pri milito al Lando, kiu estis bruldezertita, estas ne nur maljuste kaj senrespondece. Li degnias al Moskva reĝimo, ĉar g[^]i proponas rabadon de naturaj resursojn en okupitaj teritorioj de Ukrainio.

Moskva reĝimo jam malavare disdonis forŝtelitan rikolton el okupitaj teritorioj. Do c[^]e ili estas nenio nova. Per forŝtelita greno kaj ŝtalo ili pagas al Ĉinio pór ĉirkauiro de restriktioj, deflektoj de komunikaciaj kabloj k.t.p.

En tuta Europo oni spertis atakoj al civil'ulojn inspiritaj, pagitaj kaj organizitaj de rusaj agentoj. Sed TRUMP estas kvazau blinda kaj surda, se temas pli iu rusa krimo, li avidas nur profiton kaj pór g[^]i povas pakti kun iu ajn krimulo.

Al RF 50% de armiloj liveras Norda Koreo. Ili denove elpafis balistikan raketon pór montri sian fortecon. Lunde ĉe rusa-ukraina fronto okazis 47 bataloj, al ukrainaj urboj falis 30 aviabomboj, estis senditaj 267 senpilotaj flugaparatoj, kiuj detruis log[^]domojn. Tio tute ne aspektas kiel streboj al paco. Atako daurigis dum 6 horojn.

En centro de Prago kunvenis homoj pór memorigi 3 jarojn de rusa invado al Ukrainio. Ĉeha prezidento P. PAVEL esrpinis subtenon al Ukrainio kaj ZELENSKÝ.

Kaj diris ke unuig[^]inta Europo povas kaj devas solvi sekurecajn demandojn. En Pragaj teatroj oni havas dum tuta monato ukrainan temon.

Baldau okazas ankoraŭ unu konferenco por europaj land'estroj, oni devas decidi pri komunaj paŝoj en okazo, ke Usono ĉesos plenumi sian aliancan devon.

Olga

2025. 3. 1 チェコ共和国 こんにちは、泰雄さん。

確かに泰雄さんの言う通りです。トランプ氏の取り組みは平和とは全く関係ありません。チェコ共和国には、「口輪は家畜小屋ではない。牛が鳴いていると口輪を閉じることはできない」という諺がある。たとえそれが良い言葉ではないとしても、それはトランプ内閣の会議中にトランプとゼレンスキーの間で起こった状況を正確に表現している。なぜなら、トランプはゼレンスキー大統領を打ち砕き、彼に条件を押し付けるために会議を始めたからだ。彼は、誤った情報、虚偽の告発、侮辱、脅迫、要求、そしてゼレンスキーに対する残忍な攻撃から始めました。彼は強固で永続的な平和を保証することは何もせず、実際、少なくとも受け入れられるものは何も提示しなかったが、3年間の戦争の間、かなり大きな国を率いて耐え抜いた男を脅迫したり屈辱を与えたりすることは容易なことではない。すでに3年間、ロシアの爆撃を毎日受けてきた男が、トランプの狂気じみた批判を勇敢に否定した。

そしてこれはゼレンスキー氏の外交手腕の問題ではない。なぜなら会談前、トランプ氏は7分(!)の会話の後にポーランド大統領をオフィスから追い出したからだ。そして他のヨーロッパの外交官たちもほとんど同じような結末を迎えた。つまり、トランプはろくでなしのような外交官であり、偽造された統計だけを信じ、自分の国のためにさえまだ何も役に立つことをしていないにもかかわらず、一般の人々をデミウルゴス（造物神?）のように見ているのだ。

アメリカでは、彼が多くの人々を失望させたため、彼に対する不信感の表明が取り沙汰されている。彼は守れない約束をたくさんする。そして、火災によって荒廃した国に戦争の非難を投げかけることは、不公平であり無責任であるだけではありません。彼は、ウクライナの占領地における天然資源の略奪を提案しているモスクワ政権をよいしょしている。モスクワ政権はすでに占領地から盗んだ農作物を惜しみなく分配している。つまり、それらについては何も新しいことはないのです。彼らは盗んだ穀物や家畜を使って、中国に規制を回避したり、通信ケーブルを迂回させたりするための報酬を支払っている。

ヨーロッパ全土で、ロシアの工作員によって唆され、資金提供され、組織された民間人への攻撃が発生している。しかし、トランプはまるで目も見えず耳も聞こえないかのように、ロシアの犯罪に関しては、利益だけを望み、そのためにはどんな犯罪者とも協定を結ぶことができるのだ。北朝鮮はロシアの兵器の50%を供給している。彼らは自らの強さを示すために再び弾道ミサイルを発射した。

月曜日にはロシア・ウクライナ戦線で47回の戦闘が行われ、ウクライナの都市に30発の空爆が落とされ、267機のドローンが飛ばされて住宅が破壊された。それは全く平和に向けた努力には見えません。攻撃は6時間続いた。

チェコでは、ロシアのウクライナ侵攻3周年を記念して、人々がプラハの中心部に集まった。チェコのパヴェル大統領はウクライナとゼレンスキー大統領への支持を表明した。そして彼は、統一された欧州は安全保障問題を解決できるし、解決しなければならないと述べた。プラハの劇場では、1か月間ウクライナをテーマにした公演が行われます。

欧州首脳による新たな会議が近々開催される予定であり、米国が同盟義務を果たさなくなった場合の共同措置を決定する必要がある。 オルガ

2025.3.1 日本

トランプには、民主主義擁護という観点がなく、鉱物資源の獲得が眼目の様に思えます。バイデンの時には、武器供与は無償だったように思えますが、トランプになったら急に鉱物資源の話が出て、武器を送るから見返りに貴金属をよこせ、という商取引になりました。そこまでは飲めるにしても、安全保障がなければ、飲めない話だと思います。休戦になれば、その間にロシアは軍備を強化し、最終的にはウクライナの併呑を狙うでしょう。そうなったとき、ウクライナ国民は、どんな扱いを受けるようになるか、それを考えたら恐ろしい気持ちになります。そうならないようにするために、ゼレンスキーは NATO への加入を願っているわけで、それと同等の保証がなければ、ウクライナをロシアに差し出すのと同じ結果になってしまいます。それは許せないことでしょう。ですから、ゼレンスキーがトランプの提案を呑まなかったのは理解できます。しかし、EU の状況を見ると、ウクライナが勝つのも容易ではないですね。人命がどんどん失われ、北朝鮮人まで犠牲になり、何とかプーチンに死んでもらうしか手段はないですね。

また、ゼレンスキーは英語で交渉していましたが、これは間違いだったのではないかと感じています。彼はよくしゃべっているように思いましたが、母語で話すトランプとでは、格差がありすぎます。一国の大統領としては、ウクライナ語で話し、通訳を通じて話すのが正しかったし、そうすれば、もっと冷静に、トランプの言うことも「正しく」理解できて、合意もあったのではないかと思います。堀泰雄

2025.3.1 Japanio

Al mi ŝajnas, ke Trump havas neniun intereson en defendo de demokratio kaj estis nur interesita pri akirado de raraj mineraloj. Sub Biden, ŝajnas, ke la armiloj estis senpage provizitaj, sed kiam Trump enoficiĝis, la temo de mineraloj subite aperis, kaj ĝi fariĝis komerca interkonsento, en kiu li sendus armilojn kontraŭ valoraj metaloj.

Eĉ se Zelensky estus preta akcepti tion, mi ne pensas, ke li povus akcepti la proponon, se mankus sekureco. Se okazus batalhalto, Rusio verŝajne plifortigus siajn militfortojn dume kaj finfine celus aneksi Ukrainion. Estas timige pensi, kiel oni traktos la ukrainan popolon, se tio okazos. Por eviti ke tio okazu, Zelensky volas aliĝi al NATO, kaj sen ekvivalentaj garantioj, tio egalus transdoni Ukrainion al Rusio. Tio estus ne pardonebla. Do estas kompreneble, ke Zelensky ne akceptis la proponon de Trump. Tamen, rigardante la situacion en EU, ne estos facile por Ukrainio venki. Vivoj perdiĝos pli kaj plu, kaj eĉ nordkoreanoj fariĝos viktimoj, kaj do mi nur esperas malaperon de Putin.

Alia temo: Zelensky negocis en la angla, kio eble estis eraro. Ŝajnis, ke li parolis bone, sed estis grandega kapabldiferenco inter Zelensky paprolanta eksterlandan lingvon kaj Trump parolanta sian gepatran lingvon. Kiel la prezidento de lando, estus ĝuste por li paroli en la ukraina kaj per interpretisto, kaj mi pensas, ke se li estus farinta tion, li estus povinta kompreni tion, kion Trump diras pli trankvile kaj "ĝuste", kaj ili povus atingi interkonsenton. HORI Jasuo

Incendio en Japanio



En la urbo nomata Oofunato okazas granda incendio en la montaro kaj lau la marbordo. La urbo situas apuda la Pacifika Oceano kaj en 2011 la grandega cunamo atakis la urbon. Post 14 jaroj la loĝantoj en tiu regiono iom restarig^{is}, sed ilin denove atakas kataklismo. Jam la fajro dauras 4 tagojn kaj pli disvastig^{as} kaj ne vidig^{as} la fino. Certe iuj el la suferantoj perdis sian domon rekonstruita post 2011. En la lastaj monatoj tre malofte pluvis kaj c^{ie} estas seke. Ankaŭ okazas fajro en diversaj lokoj, do ankaŭ mi estas tre zorgema pri fajro. Jasuo

日本の山火事

大船渡市では、山間部や海岸沿いで大火災が発生しました。この都市は太平洋に隣接しており、2011年に巨大な津波が都市を襲いました。14年後、その地域の住民はいくらか回復しましたが、再び大災害に襲われます。火事はすでに4日間燃え続けており、終わりが見えないままさらに広がり続けています。被災者の中には、2011年以降に再建した家を失った人もいることでしょう。ここ数カ月は雨がほとんど降らず、どこも乾燥しています。各地で火災も発生しておりますので、私も火事にも十分注意しています。ヤスオ